Laŭzana Esperanto-Societo
Decembro 2020 - n-ro 10

# Laŭzana informilo

*Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe :* ***eventaservo.org/o/LES***

## *Venontaj kunsidoj:*

- Lu, la 4-an de januaro *Cléa prelegos*
- Lu, la 1-an de februaro *Ĝenerala Asembleo*
- Lu, la 1-an de marto *Decidota*
- Lu, la 5-an de aprilo *Decidota*

## Sabate, la 19-an de decembro,

### je la 11-a en *l'Auberge Communale d'Epalinges*




Ĉijare ni fonduumante festos la naskiĝdaton (la 15-an de decembro. 1859) de L.L. Zamenhof.



Via komitato esperas, ke la kronviruso, jarfine, liberigos nin.

Ni do rendevuigas al vi, kiel kutime al *l'Auberge Communale d'Epalinges.*

(Iru metroe ĝis *les Croisettes* kaj buse 45 aŭ 46 ĝis *La Croix Blanche*).

Ĝis la 11-a de decembro bonvolu aliĝi pagante

**Fr. 25.-** al nia konto: **CCP 10-26785-8.**

La restoraciestro organizos la tablojn por respekti la direktivojn de la konfederacio kaj de la vaŭda kantono.

Se vi ne deziras manĝi fonduon, vi povos elekti alian manĝaĵon.


## Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28

facebook.com/esperantolausanne
youtube.com …*esperantolausanne*
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8


**Komitato 2020**

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

**Nia programo aperas en** https://eventaservo.org/o/LES

### Babiladaj Rondoj

ambaŭgrupe, je la 19-a:

**Ve, la 4-an de decembro**
ĉe Cléa Robin
ch. Culaz 20, Vouvry
024 481 33 06 / 079 330 04 03

**Ve, la 15-an de januaro**
ĉe Charlotte Blanc Maillard
Avenue Nestlé 7, Vevey
021 922 34 74 / 079 393 32 63

**Ve, la 29-an de januaro**
ĉe Francisko Randin
Vallombreuse 14, Laŭzano
021 647 29 28 / 076 411 14 55

### La Svisa Esperanto-Etfilmkonkurso 2020


*« Unueco en diverseco »*

Sabate, la 17-an de oktobro okazis en la *Centro Karl der Grosse* (Zuriko) la spektigado de la kvar filmoj premiitaj (LES gajnis, maje, la trian premion) kaj tiuj konkursantaj por la *premio de la publiko*. Kvar el niaj membroj partoprenis la projekciadon por subteni nian filmon *« Kunveno ».*

**La realigaĵo de nia societo estis plebiscitita de la publiko de la *Svisa Esperanto-Societo.***

**Gratulon al ĉiu el vi.**


Zamenhofa Festo 2020



| | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| S | I | C | O | M | O | R | O | E | J | O |
| A | O | O | E | K | O | A | Ŭ | B | A | L |
| B | L | L | A | R | I | K | O | B | K | U |
| L | O | A | I | K | A | L | A | O | V | T |
| O | M | P | P | L | A | T | A | N | O | E |
| P | E | I | I | T | I | C | O | S | O | B |
| I | R | P | N | S | E | G | I | N | K | O |
| N | T | A | O | R | D | E | C | O | I | N |
| O | S | P | O | N | A | T | S | A | K | O |

ABATISO
ACERO
AKACIO
BETULO
CEDRO
CERATONIO
EBONO
EŬKALIPTO
GINKO
JAKVO
KASTANOPSO
LARIKO
MOKANO
PINO
PIPALO
PLATANO
SABLOPINO
SALIKO
SANTALO
SICOMORO
TREMOLO





O I B A

# Karlo de Edmond Privat — dudeka kaj lasta ĉapitro: *en Italujo*

Ĉar Karlo estis nun tre okupata kuracisto, li ne povis resti longe for de la urbo. Pro tio la edziĝovojaĝo estis ne tre longa. Aliflanke Alico forte deziris baldaŭ komenci sian edzinan vivadon en la nova hejmeto. Sed ŝi ankaŭ deziris viziti Italujon, kies nur unu havenon ŝi konis.

La junaj geedzoj traveturis Svislandon, haltante en la bela urbo Lucerno kaj celante Milanon per la Gotharda fervojo. La tuta pejzaĝo de tiu vojo inter la montoj tre forte impresis ilin per sia grandioza beleco.

Alveninte Luganon, ili estis tiel ĉarmitaj de la lago, ke ili denove haltis kelkajn tagojn kaj ankaŭ vizitis Komon kaj la ĉirkaŭan regionon. Akvoj bluaj, bluegaj, en kiuj fandiĝas oraj sunradioj, krutaj montoj silente gardstarantaj ĉirkaŭe, blankaj domoj, ĝardenoj kun vinbero kreskanta sur arboj kaj muroj: tio estas la lando de l' poezia trankvileco, kie Plinus revante promenadis antaŭ dumil jaroj.

En Milano ili pasigis tutan matenon en la turoj kaj sur la tegmento de la grandega ĉefpreĝejo, kiu blanke brilegis kvazaŭ giganta juvelo sub la hela ĉielo.

En Venecio ili longe promenadis en la palaco de l' dukoj, admirante la grandajn majstroverkojn de l' pentristoj el la venecia skolo. En nigra gondolo ili dolĉe glitadis sur la kanaloj inter la marmoraj palacoj kaj sub la arkaj pontoj. Ili ŝipveturis al la insulo Lido por vidi la maron Adriatikan. Antaŭ la ora ĉefpreĝejo de Sankta Marko ili disĵetis grenerojn al la kolomboj sur la Granda Placo. Vespere, sur la Granda Kanalo, inter la kolorpaperaj lanternoj ili sekvadis en gondolo koncertboaton, el kiu kantistoj kun gitaroj aŭ mandolinoj sonigis tra la nokto melodian arion.

En Bolonjo ili vizitis la malnovajn preĝejojn por admiri la pentraĵojn. En Romo ili vidis la Forumon, kiun ĉirkaŭas tiom da gloraj ruinaĵoj kaj plenigas tiom da eternaj memoraĵoj.

En Napolo ili vagadis ĉe l' marbordo kaj vidis nepriskribeblajn subirojn de la suno. La vaporŝipego, en kiu vojaĝis gesinjoroj Palam por reiri al Kalkuta, estis haltonta ĉe Napolo. Ĝian alvenon ili atendis, por ilin adiaŭi. Poste ili revenis hejmen haltante ankoraŭ en Nice kaj Marseille.

Tre ĝoje ili komencis sian novan kunvivadon hejme, kaj Karlo feliĉkore miris, kiel bele realiĝis lia knaba revo.






Edmond Privat 1889-1962

# Intervjuo de Pierre Delaunay, fidela membro de LES

(Fare de Francisko)



*- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**Mi naskiĝis en kukista familio en Dijon (F) la 6-an de julio 1935. Juna adolto mi iris labori kiel teknika desegnisto al Zuriko, sen scii la germanan. En 1955, mi revenis Francien militservi dum 36 monatoj, kie mi ricevis aviadilmeĥanikan diplomon. Post mia edziĝo, mi laboris en Neŭŝatela horloĝfirmao. Post mia eksedziĝo mi trovis laboron kiel asekuristo en Laŭzano. Mi restis tie ĝis mia emeriteco en 2000.**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**Mi, de ĉiam, posedis du esperantajn librojn sen neniam interesiĝi pri ĝi.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**Mi aŭdis pri kurson proponita de Francisko, novembre 2009, kaj decidís aliĝi al ĝi.**

*- Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**Nenion. Tamen mia nepo aŭdis paroli pri esperanto kaj tre fieris diri, ke li konas…**

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Mia filino - mi patras tri gefilojn - en 2015 decidis studi la internacian lingvon cele al vojaĝo tra la mondo.**

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**En 2011 mi bonŝancis partopreni la UK-on en Kopenhago (Danlando).**

**PS: Mi deziras aldoni, ke mi tre fieris ludi la rolon de Zamenhof en la filmo *LA MAGIA LANDO* en 2018.**